

# ELNA NEWSLETTER

## LITERATURA SUPLEMENTO

Literary Supplement to ELNA NEWSLETTER - Fall, 1980

Dum sufiĉe longa tempo, la Redaktoro de *ELNA Newsletter*, la Direktoro de la ELNA Centra Oficejo, kaj la Prezidanto de ELNA (kaj aliaj) pensis pri la aperigo de speciala suplemento al la *ELNA Newsletter* por ebligi la aperigon de diversaj tradukaĵoj kaj originalaj verkoj ricevitaĵoj de ELNA-anoj.

Ankaŭ estas dolorige evidente, ke mankas lastatempe la publika apero de laboro de Usonaj Esperantistoj en la literatura fako - tio estas, krom sciencaj kaj teknikaj verkoj. Vi havas en via mano nun tre modestan provon plibonigi tiun situacion.

Ni tre esperas, ke la eldono de ĉi tiu "literatura suplemento" instigos al tiuj Usonaj Esperantistoj kiuj aŭ jam tradukis aŭ verkis en Esperanto, aŭ sopirus tion fari se ekzistus rimedo por publikigi la rezultaĵojn, entrepreni almeti al la ĝis nun tro malgranda kontribuo de Usono al la literatura provizo de Esperantujo.

La enhavo de ĉi tiu suplemento ne tute elĉerpis nian stokon. Restas ankoraŭ kelkaj manuskriptoj kiel semoj por posta simila suplemento. Se iu leganto havas manuskripton de jam preta, t.e., finita, polurita, lingve kontrolita, kaj nete maŝinskribita verko, ĉu originala ĉu tradukita el la angla lingvo; tiu sendu kopion al la **ELNA Centra Oficejo, PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530**. La sendo de manuskripto aŭtomate transdonas al ELNA permeson represi ĝin. ELNA rezervas la rajton rifuzi iun manuskripton, kaj ankaŭ la rajton redakti iun verkon por forigi malĝustaĵojn pri gramatiko aŭ literumado. Se iu proponanto de manuskripto insistas, ke ĝi estu presita telkele spite de eraroj ktp, tiu ne antaŭvidu, ke ĝi aperos en la suplemento. **Ne sendu originalajn manuskriptojn.**

**La decido de la redakcio estos fina kaj neapelaciebla.**

Originala

D.K. Zamenhom'  
(Pseŭd.)

### LA VERDA KOMETO (Epoepo pri la Superheroo Zamenhom')

Zamenhom' kiel Verda Kometo  
(kaj lia helpanto Kabeto)  
krokodilojn superos  
ĝis fine aperos  
steloj verdaj sen iu diskreto.

Per Zamenkopter' veturante,  
per Zamenŝnurego ŝnurante,  
per Zamenpafil',  
kaj en Zamenmobil'  
ili ĉasas la bestojn spurante.

Ignorante eksterajn konsilojn,  
uzante la fortajn pupilojn  
de Zamenokuloj,  
en ĉiuj anguloj  
ili serĉas la fikrokodilojn.

Sed kontraŭ la homo el fero  
(kaj lia elkupra partnero)  
kontraŭstaras la fortoj  
de miloj da vortoj  
kaj la sanfranciska vetero.

Tra l'nokta nebul' ili strebas,  
dum stel' en ĉiel' verde ŝvebas,  
dum kelkaj studentoj  
per fortaj akcentoj \*  
amebas, kaj plebas, kaj bebas.

Per Zamenkopter' veturante,  
per Zamenŝnurego ŝnurante,  
per Zamenpafil'  
kaj en Zamenmobil'  
ili ĉasas la bestojn spurante.

Kaj kiom obstinas la baroj,  
kiom havas varbit' da centjaroj,  
tiom Verda Kometo  
(kaj Fida Kabeto)  
batalos ĉe ĉiaj eraroj!

"Ni spite de ĉiu doloro,  
de pedagogia esploro,  
de manka rigor',  
de ĉia ignor',  
ja atingos la finon en gloro!"

Tion ĉi fide, verde, dirante  
strebadas, dum sin martirante,  
Zamenhom' (kaj Kabeto)  
je ĉiu ripeto  
krokodilojn el akvo tirante.

Per Zamenkopter' veturante,  
per Zamenŝnurego ŝnurante,  
per Zamenpafil'  
kaj en Zamenmobil'  
ili ĉasas la bestojn spurante.

Kiom multaj verŝajne la bestoj!  
Kiom nesupereblaj la nestoj!  
(Laŭ ĉies atesto  
krokodila molesto  
pli similas al pestoj ol festoj.)

Ili el Zamenŝipoj glitantaj  
kaj de Zamenflugiloj glisantaj  
l'homaron verdigos  
kaj ĉiun restigos  
sub brustaj verdsteloj glimantaj.

Zamenhom' kiel Verda Kometo  
(kaj lia helpanto Kabeto)  
krokodilojn superos  
ĝis fine aperos  
steloj verdaj sen iu diskreto.

\* - En la netaĵo troviĝas la verso  
"sen iaj talentoj", sed mi ŝanĝis  
ĝin por ne esti malica. Mi estas  
neniam malica. [Aŭtora noto]

### ENHAVO:

Amindulino (originala poezio) - Colwell	5
Babeĉado ["Jabberwocky"] (trad.) - Cool	7
Ekzisto (originala poezio) - DeSousa	5
Ĵargonbesto, la ["Jabberwocky"] (trad.) - Boulton	6
Membriĝilo por ELNA	12
Origino de la Maro (originala prozo) - Jaderstrom	5
Preĝo de St. Francisko de Assisio (trad.) - Ricker	5
Pri du tradukaĵoj de "Jabberwocky" (orig. eseo) - Cool	6

Sorĉisto de Oz, Ĉap. IV (trad.) - Dreyer	2
Sorĉisto de Oz, Ĉap. XI (trad.) - Dreyer	8
Sorĉisto de Oz, Ĉap. XVI (trad.) - Dreyer	10
Ŝtafeto eldonaĵoj haveblaj de ELNA Libroservo	11
Terkultivistino, la (originala poezio) - Mann	4
Terura Maljunulo, la (trad.) - Burlison	3
Verda Kometo (originala io) - Jordan	1
Vivo de Porko, la (originala prozo) - Ĝiannini	5

La Mirinda Sorĉisto de Oz  
de  
L. Frank Baum

## ĈAPITRO IV - LA VOJO TRA LA ARBARO

Post kelkaj horoj la vojo malglatiĝis, kaj la marŝado tiel malfaciliĝis ke la Pajlulo ofte stumblis pro la flavaj brikoj, kiuj ĉi tie estis tre malebenaj. Iuloke, ja, ili frakasiĝis aŭ tute mankis, lasante truojn, kiujn Toto transsaltis kaj Dorotea ĉirkaŭpaŝis. Koncerne la Pajlulon, ne havante cerbon li marŝis rekte antaŭen kaj tiel paŝis en la truojn kaj falis laŭlonge sur la malmolajn brikojn. Li neniam doloriĝis, tamen, kaj Dorotea relevis lin, dum ili kune ridis je lia akcidento.

La farmoj ĉi tie ne estis tiel bone prizorgataj, kiel tiuj malantaŭe. Estis malpli da domoj kaj malpli da fruktarboj, kaj ju pli antaŭen ili iris, des pli malgaja kaj soleca iĝis la kamparo.

Je tagmezo ili sidigis ĉe la vojoflanko, proksime al malgranda rivereto, kaj Dorotea malfermis sian korbon kaj elprenis iom da pano. Ŝi proponis pecon al la Pajlulo, sed li rifuzis ĝin.

"Mi neniam malsatiĝas," li diris, "kaj estas bonŝance ke estas tiel. Ĉar mia buŝo estas nur farbita, kaj se mi tranĉus trueton tra ĝi por manĝi, la pajlo per kiu mi estas remburita eliĝus, kaj la formo de mia kapo difektiĝus."

Dorotea tuj komprenis, ke tio estas vera, do ŝi nur kapjesis kaj daŭre manĝis sian panon.

"Rakontu al mi ion pri vi mem kaj la lando de kiu vi venis," diris la Pajlulo post kiam ŝi finis la manĝadon. Do ŝi rakontis al li pri Kansaso kaj kiel ĉio tie estas griza kaj kiel la ciklono portis ŝin al ĉi tiu stranga lando de Oz. La Pajlulo aŭskultis atente, kaj diris, "Mi ne povas kompreni kial vi deziras forlasi ĉi tiun belan landon kaj reiri al tiu seka loko kiun vi nomas Kansaso."

"Tio estas ĉar vi ne havas cerbon," respondis la knabino. "Ne gravas, kiel tedaj kaj grizaj estas niaj hejmoj, ni homoj el karno preferas loĝi tie, ol en iu ajn alia lando, malgraŭ ties beleco. Al ĉi tiu besto plaĉas sia nesto."

La Pajlulo suspiris.

"Kompreneble mi ne povas ĝin kompreni," li diris. "Se viaj kapoj estus remburitaj per pajlo, kiel la mia, vi ĉiuj probable loĝus en la belaj lokoj, kaj tial Kansaso havus neniujn homojn. Estas bonŝance por Kansaso, ke vi havas cerbojn."

"Ĉu vi povas rakonti al mi historion, dum ni ripozas?" demandis la infanino.

La Pajlulo rigardis ŝin riproĉe, kaj respondis, "Mia vivo estas tiel mallonga, ke fakte mi scias nenion. Mi estis farita nur antaŭhieraŭ. Tio, kio okazis en la mondo antaŭ tiu tempo estas tute nekonata al mi. Bonŝance, kiam la farmisto faris mian kapon, unu el liaj unuaj agoj estis farbi miajn orelojn tiel ke mi aŭdis, kio okazas. Estis alia Munĉkeno kun li, kaj la unua sono, kiun mi aŭdis, estis la farmisto, dirante,

"Kiel plaĉas al vi tiuj oreloj?"

"Ili ne estas rektaj," respondis la alia.

"Ne gravas," diris la farmisto, "ili tamen estas oreloj." kio estis sufiĉe vera.

"Nun mi faros la okulojn," diris la farmisto. Tiam li farbis mian dekstran okulon, kaj tuj kiam ĝi estis finita, mi ekrigardis lin kaj la ĉirkaŭaĵojn kun multe da scivolemo, ĉar tiam estis mia unua ekvido al la mondo.

"Tiu estas iom beleta okulo," diris la Munĉkeno kiu rigardis la farmiston; 'blua farbo estas ĝuste la koloro por okuloj.'

"Mi faros la alian iomete pli granda," diris la farmisto, kaj kiam la dua okulo estis finita, mi povis vidi multe pli bone ol antaŭe. Post tio li faris miajn nazon kaj buŝon; sed mi ne parolis ĉar tiutempe mi ne sciis por kio ekzistas buŝo. Mi amuziĝis tiam rigardante ilin fari mian korpon kaj miajn brakojn kaj krurojn; kaj kiam ili fine ligis mian kapon al mia korpo, mi tre fieriĝis, ĉar mi opiniis ke mi estas ĝuste tiel bona homo, kiel iu ajn.

"Ĉi tiu ulo timigos la korvojn sufiĉe rapide," diris la farmisto. 'Li aspektas ĝuste kiel viro.'

"Nu, li estas viro," diris la alia, kaj mi ja samopiniis kun li. La farmisto portis min sub la brako al la maizkampoj, kaj metis min sur altan stangon, kie vi trovis min. Li kaj lia amiko baldaŭ formarŝis kaj lasis min sola.

"Ne plaĉis al mi esti forlasita tiamaniere, kaj mi provis marŝi post ili, sed miaj piedoj ne tuŝis la grundon, kaj mi devis resti sur tiu stango. Estis soleco, ĉar mi havis nenion por pripensi, farite antaŭ tiel mallonga tempo. Multaj korvoj kaj aliaj birdoj flugis en la maizkampojn, sed tuj kiam ili vidis min, ili forflugis, pensante ke mi estas Munĉkeno; kaj tio plaĉis al mi kaj kaŭzis min senti ke mi estas tre grava persono. Post nelonge maljuna korvo flugis apud mi, kaj rigardinte min atente, li sidis sur mian ŝultron kaj diris,

"Mi scivolas, ĉu tiu farmisto opiniis, ke li trompos min tiel stultmaniere. Ĉiu inteligenta korvo povas scii, ke vi estas nur remburita per pajlo.' Tiam li saltetis ĉe miaj piedoj kaj man ĝis ĝis satiĝo. Ankaŭ la aliaj birdoj, vidante ke li ne estis difektata per mi, venis por manĝi la maizon, tiel ke post mallonga tempo estis granda aro da ili ĉirkaŭ mi.

"Mi malĝojiĝis pro tio, ĉar montriĝis, ke mi fakte ne estas bona birdotimigilo; sed la maljuna korvo konsolis min, dirante, 'Se vi nur havus cerbon en via kapo, vi estus tiel bona viro kiel iu ajn el ili, kaj pli bona viro ol iuj el ili. Cerbo estas la sola havindaĵo en ĉi tiu mondo, ne gravas ĉu oni estas korvo aŭ homo.

"Post kiam la korvoj forflugis, mi pripensis tion, kaj decidis ke mi forte penos havigi al mi cerbon. Bonŝance, vi laŭiris kaj malsuprentiris min de sur la stango, kaj pro viaj diraĵoj mi estas certa ke la granda Oz donos al mi cerbon tuj kiam ni atingos la Smeraldan Urbon."

"Tion mi esperas," diris Dorotea, serioze, "ĉar ŝajnas ke vi tre deziras ĝin."

"Ho, jes; mi tre deziras," respondis la Pajlulo. "Estas tiel malagrabla sento scii, ke oni estas stultulo."

"Nu," diris la knabino, "ni iru." Kaj ŝi transdonis la korbon al la Pajlulo.

Estis nun neniam bariloj ĉe la vojflankoj, kaj la tereno estis malglata kaj nekultivita. Je vespero ili alvenis al granda arbaro, kie la arboj kreskis tiel grandaj kaj densaj, ke iliaj branĉoj renkontiĝis super la vojo de flavaj brikoj. Estis preskaŭ mallume sub la arboj, ĉar la branĉoj fortensis la taglumon; sed la vojaĝantoj ne haltis, kaj plueniris en la arbaron.

"Se ĉi tiu vojo eniras, ĝi devas eliri," diris la Pajlulo, "kaj ĉar la Smeralda Urbo estas ĉe la alia fino de la vojo, ni devas iri kien ajn ĝi kondukas nin."

"Iu ajn scius tion," diris Dorotea.

"Certe, tio estas kial mi scias ĝin," respondis la Pajlulo. "Se por solvi tion postulus cerbon, mi ne estus dirinta ĝin."

Post ĉirkaŭ horo la lumo malaperis, kaj ili ekstumblis antaŭen en la mallumo. Dorotea tute ne povis vidi, sed Toto povis, ĉar iuj hundoj kapablas tre bone vidi en la mallumo; kaj la Pajlulo sciigis, ke li povas vidi tiel bone, kiel en taglumo. Do ŝi ektenis lian brakon, kaj sukcesis paŝadi sufiĉe bone.

"Se vi vidos iun domon, aŭ iun lokon, kie ni povos tranokti," ŝi diris, "vi sciigu min, ĉar estas tre malagrabla marŝadi en la mallumo."

Baldaŭ la Pajlulo haltis.

"Mi vidas dometon dekstre de mi," li diris, "konstruitan el ŝtupoj kaj branĉoj. Ĉu ni iru tien?"

"Jes, ja!" respondis la infanino. "Mi plene laciĝas."

Do la Pajlulo kondukis ŝin inter la arboj ĝis ili atingis la dometon, kaj Dorotea eniris kaj trovis liton el sekiĝintaj folioj en unu angulo. Ŝi tuj kuŝiĝis, kaj kun Toto apud ŝi, baldaŭ ekdormis. La Pajlulo, kiu neniam laciĝis, staris en alia angulo kaj pacience atendis la matenon.

[Piednoto: Aperas en ĉi tiu suplemento tri ĉapitroj el la verko tradukita entute de S-ro Dreyer. La tuta verko, espereble, iam estos eldonita. Ĉiuj rajtoj pri la tradukaĵoj estas rezervitaj de S-ro Dreyer.]

Donald R. Burleson,  
Tradukinto

LA TERURA MALJUNULO  
de  
H. P. Lovecraft

Estis la intenco de Angelo Ricci kaj Joe Czaneck kaj Manuel Silva viziti la Teruran Maljunulon. Ĉi tiu maljunulo loĝas tute sole en tre antikva domo en Water Street apud la maro, kaj laŭdire estas kaj treege riĉa kaj treege malforta; ĉi tio formas situacion tre allogan por homoj de la profesio de Sinjoroj Ricci, Czaneck kaj Silva, pro tio, ke tiu profesio estis nenio malpli digna ol ŝtelo.

La enloĝantoj de Kingsport diras kaj pensas multajn aferojn pri la Terura Maljunulo, kiuj konservas lin preter la danĝero de la komplezoj de ĝentilhomoj similaj al S-ro Ricci kaj liaj kolegoj, malgraŭ la preskaŭ certa fakto, ke li kaŝas riĉaĵon de nedefinita grandeco ie ĉe sia muĉida kaj grandaĝa loĝejo. Li estas, vere, tre stranga persono, laŭdire estinte ŝipestro de Orient-Hindujaj velŝipoj en sia plejeco; tiel maljuna, ke neniu povas rememori kiam li estis juna; kaj tiel silentema, ke malmultaj scias lian veran nomon. Inter la torditaj arboj en la antaŭa korto de sia antikva kaj neglektita loĝejo li konservas strangan kolekton de grandaj ŝtonoj, strange grupigitaj kaj pentritaj, tiel ke ili similas al la idoloj en iu obskura orienta templo. Ĉi tiu kolekto fortimigas la plejmulton de la etaj knaboj kiuj amas mokriproĉi la Teruran Maljunulon pri lia longa, blanka hararo kaj barbo, aŭ rompi la malgrandpanelajn fenestrojn de lia loĝejo per malicaj ŝetaĵoj; sed estas aliaj aferoj, kiuj timigas la pli maljunajn kaj pli ŝcivolemajn homojn, kiuj ŝtelvenas al la domo por enrigardi tra la polvaj vitraĵoj. Ĉi tiuj homoj diras ke sur tablo en malplena ĉambro estas multaj strangaj boteloj, en ĉiu el ili eta peco da plumbo pendigita simile al pendolo per ŝnureto. Kaj ili diras ke la Terura Maljunulo parolas al ĉi tiuj boteloj, alparolante ilin per tiaj nomoj kiel Jack, Scar-Face, Long Tom, Spanish Joe, Peters, kaj Maato Ellis, kaj ke kiam ajn li parolas al botelo la eta plumba pendolo interna faras iajn definitajn vibradojn kvazaŭ responde. Tiuj, kiuj estas observintaj la altan, malgrasan Teruran Maljunulon en ĉi tiuj interparoladoj ne denove observas lin. Sed Angelo Ricci kaj Joe Czaneck kaj Manuel Silva ne havis Kingsportanan sangon; ili estis de tiu nova kaj heterogena fremda raso kiu kuŝas ekster la ĉarmita rondo de Novangla vivo kaj Novanglaj tradicioj, kaj ili perceptis en la Terura Maljunulo nur ŝanceliĝan, preskaŭ senpovan grizbarbulon, kiu ne povis piediri sen la helpo de sia nodplena bastono, kaj kies maldikaj, malfortaj manoj kortuŝe tremis. Ili vere, laŭ sia maniero, tre kompatis la solecan, nepopularan ulon, kiun ĉiuj evitis, kaj al kiu ĉiuj hundoj strange bojis. Sed aferoj restas aferoj, kaj por ŝtelisto kiĝs animo estas en sia profesio, estas logo kaj provoko en tre maljuna kaj tre malforta viro kiu havas neniun konton ĉe la banko, kaj pagas por siaj malmultaj necesajoj ĉe la vilaĝa butikoj per hispanaj ormoneroj kaj arĝent-moneroj monfabrikitaj antaŭ du jarcentoj.

Sinjoroj Ricci, Czaneck, kaj Silva elektis la nokton de la deknua de aprilo por sia vizito. S-ro Ricci kaj S-ro Silva okupiĝis pri intervjui la kompatindan maljunan ĝentilhomon, dum S-ro Czaneck atendus ilin kaj ilian supozeblan metalan ŝargon kun kovrita motorĉaro en Ship Street, apud la pordo en la alta malantaŭa muro de la grundoj de ilia gastiganto. La deziro eviti nenecesajn klarigojn, en la okazo de neatenditaj policaj entruĝigoj, instigis ĉi tiujn planojn por kvietaj kaj senparada foriro.

Kiel antaŭaranĝite, la tri aventuristoj malkune ekiris, por malhelpi iujn ajn malbone inklinajn suspektojn poste. Sinjoroj Ricci kaj Silva renkontiĝis en Water Street apud la pordo de la maljunulo, kaj kvankam ne plaĉis al ili kiel la luno suben brilis sur la pentritajn ŝtonojn tra la burĝonantaj branĉoj de la torditaj arboj, ili devis primediti aferojn pli gravajn ol nura vana superstiĉo. Ili timis ke eble estas neplaĉa laboro parolemigi la Teruran Maljunulon pri lia kaŝe amasigita oro kaj arĝento, ĉar maljunaj ŝipestroj estas atentinde obstinaj kaj perversaj. Tamen, li estis tre maljuna kaj tre malforta, kaj ili estis du vizitantoj. Sinjoroj Ricci kaj Silva estis spertaj pri la arto de fluparoligi nevolontajn personojn, kaj la kriegojn de malforta kaj escepte grandaĝa viro oni povas facile mutigi. Do, ili moviĝis ĝis la sola luma fenestro kaj aŭdis la Teruran Maljunulon infanece paroli al siaj boteloj kun pendoloj. Tiam ili surmetis maskojn kaj ĝentile frapis ĉe la vetermakulita kverka pordo.

La atendado ŝajnis tre longa al S-ro Czaneck dum li senripoze malkvietumis en la kovrita motorĉaro apud la malantaŭa pordo de la Terura Maljunulo en Ship Street. Li estis pli ol ordinare malkora, kaj ne plaĉis al li la malbelegaj kriegoj, kiujn li estis aŭdinta en la antikva domo tuj post la horo aranĝita por la ago. Ĉu li ne estis dirinta al siaj kolegoj, ke ili kiel eble plej milde traktu la kortuŝan, maljunan mariston? Tre timeme li rigardis tiun mallarĝan kverkan pordon en la alta kaj hedero-vestita ŝtona muro. Ofte li konsultis sian poŝhorloĝon, kaj miris pri la malfriĝo. Ĉu la maljunulo mortis sen diri kie estis kaŝita lia trezoro, kaj ĉu plena serĉo necesiĝis? S-ro Czaneck ne ŝatis tiel longtempe atendi en la mallumo en tia loko. Tiam li sensis mallaŭtan paŝadon aŭ frapeton sur la trotuaro interne de la pordo, aŭdis mildan fuŝpalpadon ĉe la rusta klinko, kaj vidis la mallarĝan, pezan pordon turniĝi internen. Kaj en la pala lumo de la sola nebrila stratlanterno li trostreĉis la okulojn por vidi kion siaj kolegoj alportis el tiu minaca domo kiu duonvidiĝis tiel proksime malantaŭe. Sed kiam li rigardis, li ne vidis tion, kion li atendis; ĉar liaj kolegoj tute ne ĉeestis, sed nur la Terura Maljunulo kliniĝante trankvile sur sia nodplena bastono kaj ridetante malbeleĝe. S-ro Czaneck estis neniam atentinta pri la koloro de la okuloj de tiu viro; li nun vidis ke ili estas flavaj.

Etaj aferoj faras konsiderindan eksciton en etaj urboj, kaj pro tio la enloĝantoj de Kingsport parolis dum la tuta printempo kaj la tuta somero tiujare pri la tri neidentigeblaj kadavroj, terure tranĉegitaj kvazaŭ per multaj glavetoj, kaj terure disŝiritaj kvazaŭ per la piedpremo de multaj bot-kalkanumoj, kiujn la tajdo surbordigis. Kaj kelkaj homoj eĉ parolis pri aferoj tiel bagatelaj kiel la forlasita motorĉaro trovita en Ship Street, aŭ pri unuj aparte nehomaj kriegoj, verŝajne de vaganta besto aŭ transmigra birdo, aŭditaj nokte de maldormaj civitanoj. Sed pri ĉi tiu vana klaĉo la Terura Maljunulo tute ne interesiĝis. Li estis nature rezervema, kaj kiam oni estas maljunega kaj malforta, oni havas duoble fortan rezervemon. Krome, tiel antikva ŝipestro sendube vidis abundon da aferoj ege pli stimulaĵaj en la foraj tagoj de sia nerememorita juneco.

[Reprinted by permission of Arkham House Publishers, Inc.,  
Sauk City, WI]

Charles Mann

## LA TERKULTIVISTINO

Alvenis la malfrue vintra sunsubiro;  
Edziĝa paro al la dometaĉo venis –  
Ekneĝpluvegis –

Kaj ilian novan hubon ja alprenis.  
Ĝi estis "nova lando" kaj ilia aspiro  
Nur estis gajni vivrimedon. Ili negis  
Ĉiujn plendojn pri la drasta vivo; tio  
Ne gravis: forta estis li, kaj portis ŝi  
Libron de poezio.

La senhava, laborema paro venis  
Al la kruela lando, kie la vetero  
Malboniĝegis,  
Kie estis bonaj ŝancoj kaj libero;  
Esperon por pli bona vivo ili tenis.  
En ĉi lando kie suferado regis  
Venigis la edzino libron, ja premio  
Gajninta en lernejo antaŭ multaj jaroj,  
Libro de poezio.

Ofte, la virino en la fruvespero –  
Kiam kolektiĝis nuboj kaj la vento  
Ne blovegis  
De velkema, heloranĝa okcidento –  
Lernis pri beleco, reĝoj, princoj, vero,  
Fabeloj, kantoj de la libro kiun ŝi legis.  
Sed ĝin la edzo nomis "libro de fantazio"  
Kaj li al ŝi rifuzis laŭte legi de la  
Libro de poezio.

"Mi sentas tion kion vidas miaj okuloj,"  
La edzo diris iu mezsomera tago –  
Ekhajlegis –

Daŭrinte, "Tiu libro estas nur imago;  
Rikoltaĵojn ne produktas la revuloj."  
Fininte la laboron, laŭte ŝi relegis;  
Diris ŝi, "Poemo sonas kiel ario;  
Pli bela estas aŭdi ies voĉon leganta  
De la poezio."

Rigoraj tagoj pasis, pli ol unu jaro;  
Al ŝi venigis la severa vivo malsanon –  
Ekneĝventegis –  
Kun ŝi enlute, tenis lian manon  
Kaj volis vivi plukun li en ĉi hubaro.  
Pace mortis ŝi, kaj plena paco tegis  
Vizaĝon ŝian. Estis tie filozofio  
Ĉar sub la kapkuseno estis ŝia libro,  
La libro de poezio.

Alproksimiĝis profundvintra sunsubiro;  
Malantaŭe restis pezaj nigraj nuboj;  
Ekfrostegegis.  
Najbaroj ĉesis la laboron sur siaj huboj  
Kaj ŝin alportis al la tombo. Ŝia viro  
Aŭskultis pastron – ja mallonge li prelegis -  
Kaj vidis ilin, kun kaŝita emocio,  
Ŝin enterigi en la proza tero kie  
Ne estis poezio.

La funeralo finiĝinte, siajn vizaĝojn  
Forturnis la hubuloj kaj triste hejmen iris.  
Malvarmiĝegis.  
Nur du personoj restis; al la pastro diris  
La edzo: "De ĉi tiu libro" (turninte paĝojn)  
"Dum sunsubiro ofte ŝi poemojn legis;  
Por ŝi ĝi estus plej bonega elegio  
Se vi legus kelkajn versojn de la libro,  
La libro de poezio."

Li rakontis plene la rakonton: kiel  
Ŝi deziris ke ili legu la poemojn –  
Ekneĝegis –  
"Ĉar ili montras belecon, helpas la problemojn,"  
Sed ĉiam li aranĝis siajn aferojn tiel  
Ne estis tempo kaj neniam ilin legis.  
"Ŝi amis grandajn verojn; versa melodio  
Ŝin sorĉis," diris li, "ŝi amis ĉiom de  
La libro de poezio."

Forglitis la malvarma tago en vesperon  
Pli malvarman. En la mano lia ĉapo –  
Ekneĝventegis –

Li aŭskultis pastron kun kliniĝinta kapo.  
Fosis li per siaj manoj en la teron –  
Post la pastro la poemon lastan legis –  
Truon en la tombo de lia tragedio  
Kaj kun ŝi kuŝigis ŝian tre valoran  
Libron de poezio.

Venis la printempo kaj degelis la lago;  
Kantis birdoj, floris floroj; la venteto  
Ekblovetis.

La edzo iris al ŝia tombo. Silueto  
Silenta, staris li delonge tiu tago.  
Li fosis, tiam, apud kie piedoj tretis;  
La dividitan libron li havigis. "Nenion  
Bezonas ŝi ĉar portas ŝi en ŝia koro  
Plenan poezion."

Malpura, paĝoj kunligitaj – la valora  
Libro traekzistis tra la ĉiuspeca  
Vintra vetero.  
Nun - purigita, riparita, unupeco –  
Ĝi restas sur la kamenbreto, loko honora;  
Kaj oftege legas li en fruvespero  
Kaj pri ŝi li pensas, kiel melodio,  
Ĉar ankaŭ, nun, ja portas li en sia koro  
Libron de poezio.

*Redaktora Noto: Neniu alia formo de literaturo kreas tiom da tendenco inter legkapabluloj, kiel la "limeriko". Iuj opinias, ke ili estas aŭ la verko de Satano aŭ netaŭgaj tempoforfrutiloj; aliaj (inkluzive la redaktoron, certajn profesorojn kaj Usonajn kaj Skotan, kaj eĉ la prezidanton de la asocio!) alte taksas tiujn kvinliniajn, malofte profundajn, foje eĉ fiecajn, dogerelaĵojn. Sed! Multaj instruistoj uzas la metodon, instigi al klasanoj provi krei limeriko(j)n, por pliakrigi la lingvoscion kaj konatiĝi plibone kun la vortaro. Tio okazis en la kursaro ĉe SFĜU en 1979, kaj la rezultaj limerikoj aperas ĉisube. (Efektive, nur kelkaj aperas; oni rajtas bedaŭri, ke inter la plej elstaraj estis tiaj, kiajn prudenta redaktoro ne uzu en publika eldonaĵo!)*

En mallumo de l' lumbildprogramo  
Pri la tram' en islama Siamo;  
Ĉu ĝi multe informis?  
Nu, aĝuloj nur dormis  
Kaj junuloj flus-flustris pri amo.

...Jim Cool

Irlanda poeto kaj bard'  
Kongresis ja ĉiam kun ard'  
Pro senfina fascino'  
Je ekvid' de virin'  
Tuj leviĝis la glora standard'.

...Daniel Burke

La mielmonata amuzo  
Por Klara montriĝis konfuzo:  
Ĉu ŝi jam estis -ita,  
Ĉu -ata aŭ -ota  
Ne klaris el Zamenhof-uzo.

...Jim Cool

Mi studas fortege vortaron  
Por akiri vortprovizaron;  
Sed se mi regresus  
Kaj poste forgesus,  
Mi similus la tutan homaron.

...Cleo Fort

Originala:

Miki Ĝiannini

### LA VIVO DE PORKO

La tuta mondo estis konfuzega al mi kiam mi estis porketo bastarda printempe jus-naskita de la senhonta porkpatrino, tial, ke kvankam miaj oreloj bone funkciis, kvankam mi havis okulojn, kvankam la haŭto povis senti sub mi la falĉitan de la farmisto fojnon, kvankam mia voĉo instinkte kriegadis pro intensa timigo, tamen mia cerbo zumadis pro la tromulto da enverŝanta la etan kapon informo. Sed post kelkaj horoj de malsukcesaj provadoj de marŝado, nesufiĉaj suĉoj je la laktofontoj patrinaj, multaj elstreĉoj de la kramfitaj per enutereco muskoloj, senfinaj penoj je okula malfermado, post ĉio ĉi tio mia cerbo plitrankviliĝis, kaj mi dravis for en dormantan sonĝon malluman kaj varman. Tia estis mia unua tago de porka vivo.

Post tiu tago, tempo verŝajne plirapidigis, kaj je la fino de l'somero, lerninta du lingvojn, porka kaj ŝafa (kaj iomete de la bova), kaj manĝinta tiom da forĵetaĵoj ke mi pezis preskaŭ cent funtojn, kaj estanta la plej bona kotisto en la tuta porkejo, mi sentis min tute preta estiĝi ano de la plenkreskula porkosocio, kvankam ili ne estis pretaj por mi, dirante ke mi devus atingi la aĝon unujaran antaŭ ol esti iniciita en la fieran kaj ĉiopovan porkosocion. Do mi elspezis la aŭtunon kaj vintron manĝante, lernante, dormante, kaj preskaŭ ĉiam pensante kaj planante pri la venonta printempo, kiam la sekrete kreita de mi komplota ekkomencos por tio, ke mi estu la plej respektata kaj laŭdata porko en la mondo kaj tenu la porkejan sterkamason kiel mian kaj sole mian. Finfine venis la printempo kun granda verda kreskado kaj pli bonaj forĵetaĵoj.

Nu, por mallongigi la rakonton, kun multaj neantaŭvideblaj okazoj, kun grandaj trompoj de la aliaj stultporkaĉoj, kun multekostaj subaĉetoj, kaj kun inteligenta uzado de bongustaĵoj kaj porkprostituitinoj, mi plejparte atingis la deziratan de mi celon, esti la preskaŭ-diktatoro de nia socio, laŭdata kaj respektata de la tuta porkaro; kvankam mi nur posedis okdek kvar procentojn de la sterkamaso (certe direktebliga interezo). Tamen, Kia Kruela Sorto! mi estiĝis la viktimo de la vivsuĉaj trihinaj vermoj, kaj dum la tri monatoj kiam mi estis malsanega, la farmisto forprenis la tutan amatan de mi sterkamason kaj mia vicdiktatoro levigis al tutpovo, kaj miaj riĉaĵoj kaj eksregno falis en ruinon. Sed ne tro gravas al mi, ĉar kiel oni diras, "Mono perdita - nenio perdita; Honoro perdita - ĉio perdita".

[Redaktora Noto: Ni ĵuras al vi, ke la apero de la supra artikolo en ĉi tiu Voĉdona Jaro estas pura hazardo.]

Originala

Havaja legendo, rerakontita de Reginald Jaderstrom

### LA ORIGINO DE LA MARO

Pele estis la diino de la vulkanoj. Ŝi povas preni la formon de bela junulino, aŭ tiun de malbela maljunulino. La solan sendanĝeran aferon fari dum oni estas en Havajo, estas esti ĝentila al ĉiuj malbelaj maljunulinoj kaj sin gardi kontraŭ ĉiuj belulinoj. Multaj ĉefoj enamiĝis al Havaja junulino, kaj poste eksciis ke ŝi estis Pele. Ĉar kiam la fajro-diino koleras, ŝi piedfrapas, kaj la tero tremas. Ŝi vokas tondron, fulmon, kaj riverojn el lafo; kaj ŝi postkuras la homon, kiu ŝin kolerigis. La ok insuloj de Havajo estas ĉiuj bruligitaj de ŝiaj koleremaj eksplodoj.

Ĉi tiu fajreca diino naskiĝis en lando, kiu kuŝas ĉe la rando de la maro. Ŝi edziniĝis kaj estis tre feliĉa, ĝis forkuris ŝia edzo kun virino el la ĉieloj. En tiu tempo la mondo estis kovrita de seka tero. Ne ekzistis maro. Ne ekzistis freŝa akvo. Pele provis kuratingi sian forkurintan edzon, kaj kiam ŝi ne povis, ŝia patro donis al ŝi floton da kanotoj kun ruĝaj veloj, kaj ŝia patrino donis al ŝi la maron. Pele apogis sin ĉe la pruo de sia kanoto, kaj elverŝis la maron el sia frunto.

Dum la kanotaro floris antaŭen sur la inundo, la fratoj de Pele ĉantis:

"Ho la maro, la granda maro!

Elspruĉas la maro:

Jen, ĝi elspruĉas sur Kanaloa-n!"

Dum ili veturis antaŭen, la maro plialtiĝis kaj kovris la vastan teron. Fine ili vidis ĉielarkon kurbiĝantan super tri dronantaj montoj. Pele levis la kapon kaj staris kun la dorso tiel rekta kiel kruteĝaĵo, kaj la vizaĝo tiel bela kiel la luno. "Tio estas Havajo! Havajo estos mia hejmo!" ŝi kriis.

La akvoj retiriĝis, kaj el la malhela blua maro malrapide aperis la ok insuloj de Havajo.

sur Kanaloa-n; tio estas, sur la teritorion de Kanaloa, dio de la allumo. Ĝi estas la Suba Tero de la Havaja folkloro.

El la Angla:

John Ricker Tradukinto

### PREĜO DE SANKTA FRANCISKO DE ASSISIO

Sinjoro, igu min ilo de Via paco:

kie estas malamo, mi semu amon;

kie estas ofendo, pardonon;

kie estas dubo, fidon;

kie estas malespero, esperon;

kie estas mallumo, lumon;

kie estas malĝojo, ĝojon.

Ho Dia Majstro, donu, ke mi povu

serĉi ne tiom esti konsolata kiel konsoli;

ne tiom esti komprenata, kiel kompreni;

ne tiom esti amata, kiel ami;

Ĉar kiam ni donas, ni ricevas;

kiam ni pardonas, ni estas pardonataj;

kaj kiam ni mortas, ni estas naskataj

en la eternan vivon.

Originala:

Paulo S. DeSousa

### EKZISTO

Ke mi naskiĝis

Estas pruvate de unu dokumento.

Ke mi estas ankoraŭ vivanta...

Estas pruvate per la foresto de alia dokumento

En la sama registro.

Sed, kiu mi estas?

Mi, kiu estas nekonata al mi mem!

Tiel multe skizinte la individuecon,

Mi estas nepreciza reflektajo de mi mem;

Pro tro multo da ambicio,

Mi estas tio, kion mi ne ambicias;

Kaj, pro tro multo da filozofio,

Mi forlasis la idealon kaj ĉirkaŭprenis la racion,

Racio, kiu, en la nomo de la universala vero

Petegas, ... postulas,

Ke kiam oni aldonos al mia registro

La fatalan ateston,

Tuj oni bruligu ĝin!

Ĉar, efektive...

Mi eĉ ne gustumis la vivon.

Originala:

Richard Culwell

### AMINDULINO

(Dediĉita al Jane Svoboda)

Mia karulino estas

Mireginda junulino:

El la mondo la plej bela

Kaj agrabla ĉarmulino.

Kiam ŝi nur ekridetas,

Ekscitiĝas mia koro:

Heliantoj ekfloretras

Kun brilega sun-koloro!

En la trankvila blueco

De ŝiaj okul-irisoj,

Mi perdiĝas dum beleco

Elradias per vid-kisoj.

Ŝia personeco plaĉa -

La afabla bon-humoro -

Estas tiel aprobataj,

Kiel bela rozodoro.

Jen la fonto, kiu donas

Al mi tian feliĉegon.

Nepre kun ŝi mi nur konas

Ebriigan plezuregon!

[Redaktora Noto: Por amantoj de la verkoj de Lewis Carroll, jen frandaĵo ja. Ne nur unu, sed du tradukoj de la fama poemo "Jabberwocky" en Esperanto, kune kun elstare erudicia disertacio kiu, krom esti ĝisdetale informoplena, montras tion kio povas okazi kiam enketema profesoro traktas tiel-nomatan "sensencan poemon". Tion vi vidas en la traduko "Babeĉado"; kaj kompare, ankaŭ aperas la traduko de Marjorie Boulton, kies famo kiel poeto kaj aŭtoro etendas tra tuta Esperantujo. Ĝuu!]

## PRI DU TRADUKOJ DE "JABBERWOCKY"

D-ro Jim Cool

El la Angla:

Marjorie Boulton  
Tradukinto

### LA ĴARGONBESTO (Jabberwocky) de Lewis Carroll

Brilumis, kaj la ŝlirtaj melfoj  
en la iejo ĝiris, ŝraŭis;  
mizaris la maldikdudelfoj,  
forfuraj ratjoj vaŭis.

"Evitu, filo, Ĵargonbeston!  
—Ungoj kaj buŝ' por mord' kaj kap't!  
Evitu bombonbirdan neston!  
Vin gardu kontraŭ Bendorapt'!"

Vorpalan glavon li elprenis,  
kaj vagis post la best' vostunta;  
al rabrabarbo li alvenis,  
ripozis en medit' profunda.

Dum staris li, pensante sie,  
la Ĵargonbesto flamokula  
tra nugraj arboj fajfefie  
alvenis, babulula!

Jen unu! du! kaj tra kaj tro  
vorpala klingo, krake-frap!  
Morto! Galopŝke la hero'  
reiris kun la kap'!

"Ĉu Ĵargonbeston frapis vi?  
Min ĉirkaŭbraku, luma filo!  
Trofeferi! Hej ho, hu hi!"  
eksplodis ĝojotrililo.

Brilumis, kaj la ŝlirtaj melfoj  
en la iejo ĝiris, ŝraŭis;  
mizaris la maldikdudelfoj,  
forfuraj ratjoj vaŭis.

Antaŭ nelonge Claude Piron (en "Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?") atentigis, ke la frazo, "Mi rakle, felbis la burnan kazumon per mia felbilo kaj ĝi bemis al mi" estas sentata kiel Esperanto kvankam ni tute ne komprenas ĝian signifon. Ion similan spertas ni kaj Alicia (en *Tra la spegulo*) kiam ni aŭdas la "anglan" poemon "Jabberwocky". "Ĉi sonas belege," prikomentis Alicia, "sed ĝi estas iom malfacile komprenebla... Ĉi iel ŝajnas plenigi la kapon de ideoj—tamen mi ne scias precize kiaj." Fakte, "Jabberwocky," kvankam oni nomas ĝin la plej ŝatata sensenca poemo en la angla lingvo, ne estas tute sensenca: eĉ Alicia klare komprenis, ke "iu ion mortigis". Ĉi tamen prezentas plurajn interesajn problemojn al tradukantoj.

Ĉi tiajn problemojn mi frontis pasintsomere dum la SFĜU-kursaro kiam Prof-o David Jordan defis, ke kursanoj traduku "Jabberwocky". Mi levis la ganton, nesciante, ke ĝin jam tradukis Marjorie Boulton. Tiel okazis, ke estiĝis du individuaj, sendependaj tradukoj; komparo de ŝia traduko al la mia multe instruis min, kaj ĝi eble interesos aliajn tradukantojn.

Mi nun povas distingi kvar alir-manierojn por Esperantigi la sensencajn angleskaĵojn de "Jabberwocky":

(1) Carroll-fanatikuloj, kun la *Annotated Alice* (redaktis Gardner, 1960) ĉemane, povos provi traduki la sencojn de la vortoj tiaj, kiaj ilin klarigas (ne sen kontraŭdiroj) Gardner aŭ Carroll mem: ekz., laŭ Carroll, *brillig* devenas de malnov-angla vorto *bryl* aŭ *broil* kaj aludas la horon por vespermanĝo-rostado, signifas do "malfrue posttagmeze".

(2) Aliaj tradukantoj perceptos en la vorto *slithy* kunfandon de *slimy* kaj *lithe*, kaj sekve provos krei similajn kunfandojn en Esperanto.

(3) Kelkaj provos, prefere ol *traduki, rekrei* en Esperanto la humurajn sonojn kaj vortludojn de la originalo per samspecaj, plene Esperantaj spritaĵoj.

(4) Malpli diligentaj tradukantoj (inter kiujn mi devas min mem — honto! — loki) rimarkos, ke la francena kaj germanena tradukintoj de "Jabberwocky" (la tradukoj troveblas en Gardner kaj ankaŭ en la *Impotenta Krestomatio* de Jordan) kontentigis sin pri nura aliformado de la nekompreneblaj angleskaj vortoj, tiel ke ĉi tiuj akiris franceskajn aŭ germaneskajn formojn: ekz., angleska toves fariĝis franceska *tôves* aŭ germaneska *Toven*.

El la subaj komentoj oni klare vidas, ke dum mi kutime sekvis la duan kaj ĉefe la kvaran procedojn, Marjorie Boulton pli ofte uzas la unuan, la duan, kaj ĉefe la trian. Efektive, la plej elstara merito de ŝia traduko estas la alta kvalito de ties Esperantesko kaj ŝia rifuzo sin turni al facilaj solvoj.

Elektonte titolon, mi rimarkis, ke "Jabberwocky" ŝajne aludis *babilon*; mi do kreis bestonomon *babeĉo*. Notindas, ke en la angla, la besto mem nomiĝas "Jabberwock" (v. 5, ekz.); "Jabberwocky" al mi aludas la econ aŭ agon de la besto, kaj mi baptis la poemon "Babeĉado". Boulton, malprave laŭ mi, ne distingas la beston disde la ago kaj elektas la titolon "Ĵargonbesto".

Kaj al Boulton kaj al mi "Twas brillig" sugestias ian sensubjektan veter-esprimon (kia ekz. *pluvus*) sed eĉ pli precize, la Esperantan vorton *brilis*. Ni ambaŭ aliformis la vorton, mi al *brelegis*, ŝi al *brilumis*. Ĉiloke, samkiel tra la tuta traduko, Boulton preferas traduki per tute akcepteblaj (se ĝis nun ne ofte viditaj) laŭregulaj Esperantaj esprimoj: ekz., *brilumis, iejo, kaj ĝiris*; mi mem elektis nur sugestii Esperantajn vortojn: *brelegis, ĝariĝis* (ankaŭ min gyre pensigis pri *ĝiris*, sed mi deziris aliigi ĝin), kaj *gletaj* (*slithy* miapense aludas *gliton*, kaj mi aliformis *glitaj*). Sed mi tro ofte uzis la iom facilan procedon (la kvaran supre), kio konsistas en la nura Esperantigo de la angleskaj vortoj: *toves/tovoj; mimsy/mimsaj; borogoves/borgovoj; mome/moma, ktp.*

Siaflanke Boulton rifuzis tiun ĉi facilan procedon; por ŝi, toves fariĝis *melfoj*, eble ĉar Carroll mem glosis toves kiel animalojn. *Melfoj* brile pensigas pri *mejoj, mevoj*, kaj eble *delfenoj* — samtempe pri bestoj, birdoj, kaj fiŝoj! Simile, Carroll eksplikas, ke *gimble* signifas *enŝraŭbi*, kaj Boulton sekve eltrovas *ŝraŭis*. Malpli facile analizeblaj estas aliaj ŝiaj tradukaĵoj: "mizaris la maldikdudelfoj"; "forfuraj ratjoj vaŭis" (krom tio, ke oni vidas rat-similajn bestojn en *ratjoj*). Evidentas tamen, ke la fonemo *aŭ* en *vaŭis* kaj la morfemoj *maldik* kaj *du* aspektas multe pli Esperanteskaj ol miaj nuraj transskriboj.

En la dua strofo, mi tre fieris pri la fidelo de mia dua verso ("Mordema faŭk', kaptema ung'!"), sed mi ankaŭ devis rifuĝi por la rimo al la febla eltrovaĵo *Banderung*; Boulton pli efike ekspluatas du plene Esperantaj rimvortojn, *kapt* kaj *-rapt* por genie redoni la anglajn *catch* kaj *-snatch*. Plua laŭdinda procedo kiun konsekvence uzas Boulton rilatas la Esperantan sonesprimivon; dum mi min kontentigis pri nura redono de **Jub-jub'** (kaj pro la metriko eĉ ne povis indiki, ke temas pri birdo), Boulton akcentas la bo-sonojn, inventante *bombonbirdo*, kiu sugestas kaj *bombo* kaj *bombono*, kaj kiu sonas pli komike en Esperanto ol mia banala *Jubjub'*. Kvankam oni ne povas diri mian *fruma* (angleska *frumious*) tre brila, estas ankaŭ vere, ke Boulton ĝin tute ne tradukas.

En la tria strofo frapas plua ekzemplo de la Boultona kapablo plene Esperantigi la humurajn sensencaĵojn de la angleska. Mi mem esperis elvoki rideton per *Tumtumuj'*, ekspluante la malnovan sufikson por arbo, Zamenhofan, sed apenaŭ uzatan. Pli eltrovema, Boulton eliras el *arb* kaj rekombinas la literojn por fari *rabrabarbo*, kiu ne nur rekreas en Esperanto komikan sonaron sed ankaŭ aludas tiun plene Esperantan (kaj en si mem sufiĉe komikan) plantnomon *rabarbo*. Ŝia humureltrovemo videblas plue en la traduko de *manxome*. Ĉar la angla "Manx cat" havas nur apenaŭ voston, la Boultona imagpovo faras el la *Jabberwock* iun beston *vostuntan*, kvazaŭ ĝi havus voston se ĝi povus! Mia propra traduko de tiu ĉi strofo ankaŭ malfortas pro mia neceso eksplacitigi (pro la rimo) ke la heroo pensas "pri taktik" dum en la originalo ne estas certe pri kio li pensas.

"Pensante sie" de la Boultona kvara strofo estas ĉarma esprimo kvankam ĝi fakte ne tradukas *uffish*; aliflanke, mia propra *ulfmense* ne plimulte tradukas nek iel ĉarmas. Estas interese, ke ni ambaŭ elektis rimi *flamokul* kun la sono de la besto kaj ke ni ambaŭ komencis la kvaran verson per *alvenis*. Refoje, mi nur Esperantigis la sensencajn anglaskaĵojn. Laŭ Boulton, la angleska *whiffling* aludas *fajton* (eble pro la angla *whistle*), kaj ŝi tradukas per *fajfemie*, tute ebla, laŭregula Esperanta kunmetaĵo, kvankam malofta. Ŝia *nugraj* aspektas aliformita *nigraj*. Efektive, oni povus riproĉi al Boulton, ke ŝia traduko iom tro malaperigas la nekompreneblajn sensencaĵojn de la originalo. Feliĉe, ŝia eltrovemo kaj sprita dirmaniero kompensas la perd-aĵojn.

Ĉu mi ne rajtas fieri pri mia kvina strofo? Ni ambaŭ rimis *kap* kaj *frap*, tamen ne samloke. Ŝia klingo *krakis*, mia *klikis*. Se mia rimo *ĉi/li* ne imponas, mi almenaŭ provis reprodukti la internan rimon (*dead/head*; *kap/gapo*) de la tria verso, kion ne faras Boulton. Per *galumpis* mi sekvis Carroll, kiu kunfandis "galloping triumphantly" en *galumphing*; ĉiloke, mi ne vidas plibonigon en la Boultona *galopŝke*.

En la sesa strofo, refoje Boulton kreis aŭtentajn Esperantajn vortojn el la originalaj anglaskaĵoj. *Beamish*, signifante *radia*, *luma*, estas tre malofta, preskaŭ nekonata vorto en la angla, sed ĝia malofteco tute ne aperas en la Boultona *luma*; mi preferis aliigi *radia* kaj samtempe sugestii *realveninta* (latina *redux*) per *redusa*. *Trofeferi'*, mia opinie, tro senbizarigas la "frabjous day"; imitante la sonon de la angleska, mi samtempe deziris aludi *ĝojon* per *ĝabra*. Ŝiaj interjekcioj estas iom komikaj sed sufiĉe distaj de la originalo. Kaj refoje, Boulton senmisterigas *chortled* (Carroll-kreaĵo kiu jam delonge ĝuas plenan civitanecon en la angla); almenaŭ mia *klukis* estas iom fremda.

Antaŭ ol fini, mi atentigu mallonge pri la metriko kaj rimado. Iom surprize la Boultona traduko ne sekvas la tre regulan metrikon de la originalo. En la angla poemo, ĉiu verso finiĝas per vira rimo (akcentporta silabo). Ĉar oni malkonsilas la troan eliziadon kiun necesigas viraj rimoj en la Esperanta poezio, mi provis kompromison: fini per virinaj rimoj la unuan kaj trian versojn, per viraj la duan kaj kvaran. Tiun rimformon mi penis ĉiam fidele sekvi. Boulton aliflanke hezitas inter jen viraj jen virinaj rimoj en ĉiuj strofoversoj; sekve, la ritmo de ŝia traduko iom lamas. Do rilate la eksteran formon, mia traduko rajtas pretendi iom elstari super la ŝia.

Entute, oni rajtas kritiki en ŝia traduko ne nur la feblan metrikon sen ankaŭ la fojan perdiĝon de originalaj bizaraĵoj, kiuj troe reguliĝas kaj malfortiĝis en ŝia Esperanta traduko. Sed samtempe, la traduko de Boulton imponas ĝuste pro tiu sama esenca Esperanteco. Al ŝi ne sufiĉas nur alpendigi Esperantajn finiĝojn al la anglaskaj sensencaj radikoj; por ŝia traduko ŝi inventas ŝercojn tute Esperantajn kaj efike ekspluatas la individuajn ecojn de Esperantaj sonoj kaj vortludoj, tiel kreante humuraĵojn eblajn nur en Esperanto. Tia tradukon kapablas nur majstreca poeto kiu jam dum jaroj laboras sondante kaj pesante la elementojn de sia lingvo.

El la Angla:

Jim Cool  
Tradukinto

**BABEĈADO**  
(**Jabberwocky**)  
de  
Lewis Carroll

Brelegis, kaj la gletaj tovoj  
Ĉariĝis ĝimble en la gar';  
Tre mimsaj estis la borgovoj  
Grabe al moma radelar'.  
"Gardu cin de l' babeĉ', fileto!  
Mordema faŭk', kaptema ung!  
Gardu cin de l' jubjub' kaj l' treto  
De l' fruma Banderung!"  
Kaptinte per man' vorpalspadon,  
Li ĉasis al manksa malamik'--  
Kaj ĉe la tumtumuj' paŭzadon  
Dediĉis al taktik'.  
Ulfmense restis li en staro;  
Lo! la babeĉ, kun flamokul',  
Viŭlante tra l' tulgeca arbaro  
Alvenis kun borbul'!  
Un', du! Un', du! Kaj frap' - refrapo  
La vorpalklingo klikis ĉi!  
Kun ĝia kap' en morta gapo  
Reen galumpis li.  
"Kaj ĉu ci murdis la babeĉon?  
En miajn brakojn, redusa fil'!  
Ho ĝabra tag! Karan! Kareĉon!"  
Li klukis pro l' jubil'.  
Brelegis, kaj la gletaj tovoj  
Ĉariĝis ĝimble en la gar';  
Tre mimsaj estis la borgovoj,  
Grabe al moma radelar'.

## ĈAPITRO XI - LA MIRINDA SMERALDA URBO DE OZ

Eĉ kun okuloj ŝirmitaj per la verdaj okulvitroj, Dorotea kaj ŝiaj amikoj unue estis iomete blindigitaj per la brileco de la mirinda Urbo. La stratoj estis vicigitaj de belaj domoj, ĉiuj konstruitaj el verda marmoro kaj punktitaj ĉie per fajreraj smeraldoj. Ili marŝis laŭlonge de pavimo el la sama verda marmoro, kaj kie la blokoj kuniĝis estis vicoj da smeraldoj, dense inkrustitaj, kaj ekbrilantaj en la suno. La fenestroj vitroj estis el verda vitro; eĉ la ĉielo super la Urbo havis verdan nuancon, kaj la radioj de la suno estis verdaj.

Estis multe da homoj, viroj, virinoj kaj geinfanoj promenataj, kaj ĉiuj portis verdajn vestaĵojn kaj havis verdecajn haŭtojn. Ili ekrigardis al Dorotea kaj ŝia stranga grupo kun mirigitaj okuloj, kaj la infanoj forkuris kaj kaŝis sin malantaŭ siaj patrinaj kiam ili vidis la Leonon; sed neniu parolis al ili. Laŭlonge de la strato estis multaj butikoj, kaj Dorotea vidis, ke ĉio en ili estas verda. Verda kando kaj verda krevmaizo vendiĝis, krom verdaj ŝuoj, verdaj ĉapeloj, kaj verdaj vestaĵoj de ĉiuj specoj. Ĉe unu loko viro vendis verdan limonadon, kaj kiam la infanoj aĉetis ĝin, Dorotea vidis ke ili pagis por ĝi per verdaj spesoj.

Ŝajne ne estis ĉevaloj aŭ iaj bestoj; la viroj portis aĵojn en malgrandaj verdaj ĉaroj, kiujn ili puŝis antaŭ si. Ĉiu ŝajnis feliĉa kaj kontenta kaj prospera.

La Gardisto de la Pordego kondukis ilin tra la stratoj ĝis ili alvenis al granda konstruaĵo, ĝuste en la mezo de la Urbo, kiu estis la Palaco de Oz, la Granda Sorĉisto. Estis soldato antaŭ la pordo, vestita per verda uniformo kaj kun longa, verda barbo.

"Jen fremduloj," diris la Gardisto de la Pordego al li, "kaj ili postulas vidi la Grandan Oz."

"Enpaŝu," respondis la soldato, "kaj mi portos vian mesaĝon al li."

Do ili trapasis la Palacajn pordegojn kaj estis kondukataj en grandan ĉambron kun verda tapiŝo kaj bela verda meblaro inkrustita de smeraldoj. La soldato devis ilin viŝi la piedojn per verda mato antaŭ ol enveni en ĉi tiun ĉambron, kaj kiam ili sidigis li diris, ĝentile,

"Bonvole komfortiĝu dum mi iras al la pordo de la Tronĉambro kaj sciigos al Oz ke vi estas ĉi tie."

Ili devis atendi longan tempon antaŭ ol la soldato revenis. Kiam, finfine, li revenis Dorotea demandis,

"Ĉu vi vidis Oz?"

"Ho, ne," respondis la soldato; "Mi neniam vidis lin. Sed mi parolis al li dum li sidis malantaŭ sia ekrano, kaj donis al li vian mesaĝon. Li diris ke li donos al vi la aŭdiencon se vi volas; sed ĉiu el vi devas eniri al lian ĉeeston sola, kaj li enlasos nur po unu ĉiutage. Tial, ĉar vi devas resti en la Palaco kelkajn tagojn, mi kondukos vin al ĉambroj kie vi povos ripozi komforte post via vojaĝo."

"Dankon," respondis la knabino, "tio estas tre afable de Oz."

La soldato nun blovis verdan fajfilon, kaj tuj envenis en la ĉambron juna knabino, vestita per beleta verda robo. Ŝi havis ravan verdan hararon kaj verdajn okulojn, kaj ŝi malalte riverencis antaŭ Dorotea dum ŝi diris,

"Sekvu min kaj mi montros al vi vian ĉambron."

Do Dorotea adiaŭis ĉiujn siajn amikojn krom Toto, kaj prenante la hundon en ŝiaj brakoj sekvis la verdan knabinon tra kelkaj koridoroj kaj supren sur tri ŝtuparoj ĝis ili atingis ĉambron ĉe la fronto de la Palaco. Estis la plej dolĉa ĉambro en la mondo kun mola, komforta lito kiu havis litotukojn el verda silko kaj verdan kovrilon. Estis eta fontano en la mezo de la ĉambro kiu ŝprucis verdan parfumon en la aeron, kiu refalis en bele ĉizitan verdan marmoran basenon. Belaj verdaj floroj staris en la fenestroj, kaj estis breto kun vico da etaj, verdaj libroj. Kiam Dorotea havis tempon malfermi ĉi tiujn librojn ŝi trovis ilin plenaj je strangaj, verdaj bildoj kiuj ridigis ŝin, pro tio ke ili estis tiel amuzaj.

En vestoŝranko estis multe da verdaj roboj, faritaj el silko kaj sateno kaj veluro; kaj ili ĉiuj estis ĝuste laŭmezuraj por Dorotea.

"Sentu vin ĉehejme," diris la verda knabino, "kaj se vi deziros ion sonorigu la tintilon. Oz venigos vin morgaŭ matene."

Ŝi lasis Dorotean sola kaj reiris al la aliaj. Ankaŭ ĉi tiujn ŝi kondukis al ĉambroj, ĉiu el ili trovis sin loĝanta en tre plaĉa parto de la Palaco. Komprenble ĉi tiu ĝentileco sentaŭgigis por la Pajlulo; ĉar kiam li trovis sin sola en sia ĉambro li staris stulte en unu loko, ĝuste interne de la pordo por atendi ĝis la mateno. Ne refreŝigus lin kuŝiĝi, kaj li ne povis fermi la okulojn; tial li restis la tutan nokton fikse rigardante malgrandan araneon kiu teksis sian araneaĵon en angulo de la ĉambro, kvazaŭ ĝi ne estis unu el la plej mirindaj ĉambroj en la mondo. La Stana Lignohakisto sin kuŝis sur sian liton rutine, ĉar li memoris kiam li estis farita el karno; sed ĉar li ne povis dormi, li tranoktis movante siajn artikojn tien kaj reen por esti certa, ke ili bone funkcias. La Leono preferis liton el sekaj folioj en la arbaro, kaj ne plaĉis al li esti en fermita ĉambro, sed li havis sufiĉe da prudento por ne maltrankviliĝi pro tio, do li saltis sur la liton kaj volvis sin kiel kato kaj ronronis sin ĝis ekdormo.

La sekvantan matenon, post la matenmanĝo, la verda junulino venis por aldonuki Dorotean, kaj ŝi vestis sin en unu el la plej beletaj roboj, farita el verda brokita sateno. Dorotea surmetis verdan silkan antaŭtukon kaj ligis verdan rubandon ĉirkaŭ la kolon de Toto, kaj ili ekiris al la Tronĉambro de la Granda Oz.

Unue ili alvenis al granda halo en kiu estis multe da sinjorinoj kaj sinjoroj de la kortego, ĉiuj vestitaj per riĉaj kostumoj. Ĉi tiuj personoj havis nenion por fari krom interparoli, sed ili ĉiam venis por atendi ekster la Tronĉambro ĉiumatene, kvankam ili neniam estis permesataj vidi Oz. Dum Dorotea eniris ili rigardis ŝin ŝvoleme, kaj unu el ili flustris,

"Ĉu vi efektive rigardos en la vizaĝon de Oz la Terura?"

"Komprenble," respondis la knabino, "se li akceptos min."

"Ho, li akceptos vin," diris la soldato kiu portis ŝian mesaĝon al la Sorĉisto, "kvankam ne plaĉas al li kiam personoj petas vidi lin. Ja, unue li koleriĝis kaj diris ke mi resendu vin returne de kie vi venis. Tiam li demandis min kiel vi aspektas, kaj kiam mi menciis viajn argentajn ŝuojn, li tre interesiĝis. Fine mi rakontis al li pri la signo sur via fronto, kaj li decidis, ke li akceptos vin en ŝian ĉeeston."

Ĝuste tiumomente tintilo sonoris, kaj la verda knabino diris al Dorotea,

"Tiu estas la signalo. Vi devas iri en la Tronĉambron sola."

Ŝi malfermis pordeton kaj Dorotea aŭdace tramarŝis kaj trovis sin en mirinda loko. Estis granda ronda ĉambro kun alta arkigita tegmento, kaj la muroj kaj plafono kaj planko estis kovritaj de grandaj smeraldoj dense fiksitaj. En la centro de la plafono estis granda lumo, tiel brila kiel la suno, kiu fajrerigis la smeraldojn en mirinda maniero.

Sed tio, kio plej interesis Dorotean, estis la granda trono, el verda marmoro, kiu staris en la mezo de la ĉambro. Ĝi estis formita kiel seĝo kaj fajreris per gemoj, kiel ankaŭ ĉio alia. En la centro de la seĝo estis grandega Kapo, sen korpo por subteni ĝin, aŭ iuj ajn brakoj aŭ kruroj. Ne estis haro sur ĉi tiu kapo, sed ĝi havis okulojn kaj nazon kaj buŝon, kaj estis pli granda ol la kapo de la plej granda giganto.

Dum Dorotea fikse rigardis ĉi tiun kun miro kaj timo la okuloj turniĝis malrapide kaj rigardis ŝin akre kaj firme. Tiam la buŝo moviĝis, kaj Dorotea aŭdis voĉon kiu diris,

"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura. Kiu vi estas, kaj kial vi serĉas min?"

Ne estis tiel terura voĉo kiel ŝi atendis de la granda Kapo, do ŝi kuraĝiĝis kaj respondis,

"Mi estas Dorotea, la Malgranda kaj Humila. Mi venas al vi por helpo."

La okuloj rigardis ŝin dum tuta minuto. Tiam diris la voĉo: "Kie vi akiris la argentajn ŝuojn?"

"Mi akiris ilin de la malbona Sorĉistino de la Oriento, kiam mia domo falis sur ŝin kaj mortigis ŝin," ŝi respondis.

"Kie vi akiris la signon sur via fronto?" daŭris la voĉo.

"Tiu estas kie la Bona Sorĉistino de la Nordo kisis min kiam ŝi adiaŭis min kaj sendis min al vi," diris la knabino.



Denove la okuloj akre rigardis ŝin kaj ili vidis, ke ŝi diris la veron. Tiam demandis Oz,

"Kion vi deziras, ke mi faru?"

"Sendu min al Kansaso, kie estas miaj Onklino Ema kaj Onklo Henriko," ŝi respondis, serioze. "Mi ne ŝatas vian landon, kvankam ĝi estas tiel bela. Kaj mi estas certa, ke Onklinjo Ema tre ĉagreniĝas ke mi forestas tiel longe."

La okuloj palpebrumis trifoje, kaj tiam ili turnis sin al la plafono kaj malsupren al la planko kaj ĉirkaŭruliĝis tiel strange ke ŝajnis, ke ili vidas ĉiun parton de la ĉambro. Kaj finfine ili denove rigardis Dorotean.

"Kial mi devus fari tion por vi?" demandis Oz.

"Ĉar vi estas forta kaj mi estas malforta; ĉar vi estas Granda Sorĉisto kaj mi estas nur senpova knabineto," ŝi respondis.

"Sed vi estis sufiĉe forta por mortigi la Malbonan Sorĉistino de la Oriento," diris Oz.

"Tio nur okazis," respondis Dorotea, simple; "mi ne povis regi tion."

"Nu," diris la Kapo, "mi donos al vi mian respondon. Vi ne rajtas atendi, ke mi resendu vin al Kansaso se ne vi faru ion por mi reciproke. En ĉi tiu lando ĉiu devas pagi por ĉio, kion li akiras. Se vi deziras ke mi uzu mian magian povon por resendi vin hejmen, vi unue devas fari ion por mi. Helpu min kaj mi helpos vin."

"Kion mi devas fari?" demandis la knabino.

"Mortigu la Malbonan Sorĉistino de la Okcidento," respondis Oz.

"Sed mi ne povas!" ekkriis Dorotea, tre surprizite.

"Vi mortigis la Sorĉistino de la Oriento, kaj vi portas la Argentajn Ŝuojn, kiuj enhavas potencajn sorĉojn. Restas nuntempe nur unu Malbona Sorĉistino en la tuta lando, kaj kiam vi povos sciigi al mi, ke ŝi estas mortinta, mi resendos vin al Kansaso — sed ne antaŭe."

La knabineto ekploris, ŝi estis tiel malkontenta; kaj la okuloj denove palpebrumis kaj rigardis ŝin maltrankvile, kvazaŭ Oz sentis ke ŝi helpus lin, se ŝi povus.

"Mi neniam volonte mortigis ion ajn," ŝi ploris, "kaj eĉ se mi volus, kiel mi mortigus la Malbonan Sorĉistino? Se vi, kiu estas Granda kaj Terura, ne povas mem mortigi ŝin, kiel vi supozas, ke mi faru tion?"

"Mi ne scias," diris la Kapo, "sed tio estas mia respondo, kaj ĝis la Malbona Sorĉistino mortos, vi ne vidos viajn Onklinojn kaj Onklon refoje. Memoru, ke la Sorĉistino estas Malbona — grandege malbona — kaj estas mortigenda. Do, iru, kaj ne demandu vidi min refoje ĝis via tasko plenumiĝis."

Malĝoje Dorotea eliris el la Tronĉambro kaj reiris al kie la Leono kaj la Pajlulo kaj la Stana Lignohakisto atendis por aŭdi kion Oz diris al ŝi.

"Estas neniu espero por mi," ŝi diris malgaje, "ĉar Oz ne sendos min hejmen ĝis kiam mi estas mortiginta la Malbonan Sorĉistino de la Okcidento, kaj tion mi neniam povos fari."

Ŝiaj amikoj bedaŭris, sed povis fari nenion por helpi ŝin; do ŝi iris al sia propra ĉambro kaj ekkuŝis sur la liton kaj plore endormiĝis.

La sekvantan matenon la soldato kun la verda barbo venis al la Pajlulo kaj diris,

"Venu kun mi, ĉar Oz alvokas vin."

Do la Pajlulo sekvis lin kaj estis enlasita en la grandan Tronĉambro, kie li vidis, sidantan sur la smeralda trono, tre ravan virinon. Ŝi vestiĝis per verda, silka gazo kaj portis sur siaj fluantaj, verdaj bukloj kronon juvelitan. Kreskantaj el ŝiaj ŝultroj estis flugiloj, grandioze kolorigitaj, kaj tiel malpezaj, ke ili tremis se la plej eta movo de aero atingis ilin.

Post kiam la Pajlulo riverencis, tiel belete kiel permesis al li sia pajla remburajo, antaŭ ĉi tiu bela estaĵo, ŝi rigardis lin dolĉe kaj diris,

"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura. Kiu vi estas, kaj kial vi serĉas min?"

Nu, la Pajlulo, kiu atendis vidi la grandan Kapon pri kiu rakontis al li Dorotea, estis multe mirigita, sed li respondis al ŝi kuraĝe,

"Mi estas nur birdotimigilo, remburita per pajlo. Tial mi havas neniun carbon, kaj mi venas al vi petante ke vi metu carbon en mian kapon, anstataŭ pajlo, por ke mi estu tia viro, kia iu alia en viaj regnoj."

"Kial mi devus fari tion por vi?" demandis la virino.

"Ĉar vi estas saĝa kaj potenca, kaj neniu alia povas helpi min," respondis la Pajlulo.

"Mi neniam plenumas petojn sen io reciproka," diris Oz, "sed ĉi tion mi promesas. Se vi mortigos por mi la Malbonan Sorĉistino de la Okcidento, mi donacos al vi tre grandiozan carbon, kaj tiel bonan carbon, ke vi estos la plej saĝa homo en la tuta lando de Oz."

"Mi pensis, ke vi petis Dorotean mortigi la Sorĉistino," diris la Pajlulo, surprizite.

"Tiel mi faris. Ne gravas al mi kiu ŝin mortigos. Sed ĝis kiam ŝi estos mortinta mi ne plenumos vian peton. Nun iru, kaj ne serĉu min denove, ĝis kiam vi meritos la carbon, kiun vi tiel forte deziras."

La Pajlulo reiris malĝoje al siaj amikoj kaj rakontis kion diris la Sorĉisto; kaj Dorotea surpriziĝis trovante, ke la Granda Sorĉisto ne estis Kapo, kia ŝi vidis lin, sed aminda virino.

"Tamen," diris la Pajlulo, "ŝi bezonas koron tiom, kiom la Stana Lignohakisto."

La sekvantan matenon la soldato kun la verda barbo venis al la Stana Lignohakisto kaj diris,

"Oz petas, ke vi venu. Sekvu min."

Do la Stana Lignohakisto sekvis lin kaj alvenis al la Granda Tronĉambro. Li ne sciis ĉu li trovis ke Oz estas aminda virino aŭ Kapo, sed esperis ke estos la aminda virino. "Ĉar," li diris al si, "se estas la Kapo mi estas certa, ke mi ne ricevos koron, ĉar kapo ne havas propran koron kaj tial ne povas senti kiel mi. Sed se estas la aminda virino, mi forte petos por koro, ĉar oni diras ke ĉiuj sinjorinoj estas bonkoraj."

Sed kiam la Lignohakisto eniris la Tronĉambro, li vidis nek la Kapon nek la Virinon, ĉar Oz prenis la formon de plej terura besto. Ĝi estis preskaŭ tiel granda kiel elefanto, kaj la verda trono ŝajnis apenaŭ sufiĉe forta por porti ĝian pezon. La Besto havis kapon kiel tiu de rinocero, sed estis kvin okuloj en la vizaĝo. Kvin longaj brakoj kreskis el ĝia korpo, kaj ĝi ankaŭ havis kvin longajn maldikajn krurojn. Dikaj lansimilaj haroj kovris ĉiun parton de ĝi, kaj oni ne povis imagi pli teruran monstron. Tiumomente estis bonŝance ke la Stana Lignohakisto havis neniun koron, ĉar ĝi batus laŭte kaj rapide pro teruro. Sed estante nur stano, la Lignohakisto tute ne timis, kvankam liaj esperoj trompiĝis.

"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura," diris la Besto, per voĉo kiu ŝajnis esti unu granda muĝo. "Kiu vi estas, kaj kial vi serĉas min?"

"Mi estas Lignohakisto, farita el stano. Tial mi ne havas koron, kaj ne povas ami. Mi petas vin, donu al mi koron, por ke mi estu kiel aliaj viroj."

"Kial mi devus fari tion por vi?" demandis la Besto.

"Ĉar mi petas, kaj nur vi povas plenumi mian peton," respondis la Lignohakisto.

Oz faris mallaŭtan graŭlon je tio, sed diris raŭke,

"Se vi ja deziras koron, vi devas meriti ĝin."

"Kiel?" demandis la Stana Lignohakisto.

"Helpu Dorotean mortigi la Malbonan Sorĉistino de la Okcidento," respondis la Besto. "Kiam la Sorĉistino estos mortinta, venu al mi kaj mi donos al vi la plej grandan kaj plej amegan koron en la tuta lando de Oz."

Do la Stana Lignohakisto devis reiri malĝoje al siaj amikoj kaj rakonti al ili pri la terura Besto kiun li vidis. Ili ĉiuj miris pri la multaj formoj kiujn la Granda Sorĉisto povis uzi, kaj la Leono diris,

"Se li estos besto kiam mi vidos lin, mi muĝos mian plej laŭtan, kaj tiel timigos lin, ke li donos al mi ĉiujn miajn petojn. Kaj se li estos la aminda virino, mi ŝajnigos salti sur ŝin, kaj tiel devigos ŝin, ke ŝi faru miajn dezirojn. Kaj se li estos la Granda Kapo, li estos sub mia povo; ĉar mi ĉirkaŭrulos la Kapon ĝis li promesos doni al ni tion, kion ni deziras. Do, gajigu vin, miaj amikoj, ĉar ĉio tamen estos bona"

La sekvantan matenon la soldato kun la verda barbo kondukis la Leonon al la Granda Tronĉambro kaj petis lin eniri en la ĉeeston de Oz.

La Leono tuj trapasis la pordon, kaj ĉirkaŭrigardante, vidis, al sia surprizo, ke antaŭ la trono estis Bulo de Fajro, tiel furioza kaj arda, ke li apenaŭ povis rigardi ĝin. Lia unua penso estis ke Oz hazarde ekbrulis kaj forbrulis; sed kiam li provis pliproksimiĝi, la ardo estis tiel intensa, ke ĝi bruletigis liajn vizagharojn, kaj li rerampis al loko pli proksima al la pordo.

Tiam venis mallaŭta, kvieta voĉo el la Bulo de Fajro, kaj ĉi tiuj estas la vortoj, kiujn ĝi parolis:

"Mi estas Oz, la Granda kaj Terura. Kiu vi estas, kaj kial vi serĉas min?" Kaj la Leono respondis,

"Mi estas Timema Leono; mi timas ĉion. Mi venas al vi por peti, ke vi donu al mi kuraĝon, tiel ke en efektivo mi povu fariĝi Reĝo de la Bestoj, kiel homoj nomas min."

"Kial mi donus al vi la kuraĝon?" demandis Oz.

"Ĉar el ĉiuj sorĉistoj vi estas la plej granda, kaj sole havas la povon plenumi mian peton," respondis la Leono.

La Bulo de Fajro brulis furioze dumtempe, kaj la voĉo diris, "Alportu al mi pruvon ke la Malbona Sorĉistino estas mortinta, kaj tiumomente mi donos al vi la kuraĝon. Sed tiel longe kiel la Sorĉistino vivos, vi devos resti malkuraĝulo."

La Leono koleriĝis je tiu parolo, sed povis diri nenion responde, kaj dum li staris silente kaj fiksrigardis al la Bulo de Fajro, ĝi tiel furioze varmegiĝis, ke li ekturniĝis kaj kuregis el la ĉambro. Li ĝojis trovi siajn amikojn atendantaj al li, kaj rakontis al ili pri sia terura intervjuo kun la Sorĉisto.

"Kion ni nun faros?" demandis Dorotea, malĝoje.

"Estas nur unu afero farenda," respondis la Leono, "kaj tio estas iri al la lando de la Vinkioj, elserĉi la Malbonan Sorĉistinon, kaj detrui ŝin."

"Sed supozu, ke ni ne povos?" diris la knabino.

"Tiuokaze mi neniam havos la kuraĝon," deklaris la Leono.

"Kaj mi neniam havos cerbon," aldonis la Pajlulo.

"Kaj mi neniam havos koron," diris la Stana Lignohakisto.

"Kaj mi neniam revidos Onklinon Ema kaj Onklon Henriko," diris Dorotea, ekplorante.

"Gardu vin!" ekkriis la verda knabino, "la larmoj falos sur vian verdan silkan robon kaj makulos ĝin."

Do Dorotea sekigis la okulojn kaj diris,

"Mi supozas ke ni devas provi; sed mi estas certa, ke mi ne deziras mortigi iun ajn, eĉ por vidi Onjon Ema denove."

"Mi iros kun vi; sed mi estas tro timema por mortigi la Sorĉistinon," diris la Leono.

"Ankaŭ mi iros," deklaris la Pajlulo; "sed mi ne multe helpos al vi, mi estas tia stultulo."

"Senkore mi ne povas dolorigi eĉ Sorĉistinon," diris la Stana Lignohakisto; "sed se vi iros mi certe akompanis vin."

Tial estis decidite komenci la vojaĝon la sekvontan matenon, kaj la Lignohakisto akiris sian hakilon per verda akriĝilo kaj zorge oleigis ĉiujn siajn artikojn. La Pajlulo remburis sin per freŝa pajlo kaj Dorotea metis novan farbon sur liajn okulojn por ke li povu vidi pli bone. La verda knabino, kiu estis tre afabla al ili, plenigis la korbon de Dorotea per bonaj manĝaĵoj kaj ligis tintileton ĉirkaŭ la kolo de Toto per verda rubando.

Ili enlitiĝis tre frue kaj profunde dormis ĝis taglumiĝo, kiam ili ekvekigis per la kokerikado de verda koko kiu loĝis en la malantaŭa korto de la palaco, kaj per la klukado de kokino kiu demetis verdan ovon.

El la Angla:

H. R. Dreyer  
Tradukinto

## Ĉapitro XVI LA MAGIA ARTO DE LA GRANDA ĈARLATANO

La sekvantan matenon la Pajlulo diris al siaj amikoj:

"Gratulu min. Mi iras finfine al Oz por akiri mian cerbon. Kiam mi revenos mi estos kiel aliaj homoj."

"Vi ĉiam estis al mi simpatia," diris Dorotea simple.

"Estas afable de vi ŝati birdotimigilon," li respondis. "Sed certe vi pli estimos min kiam vi aŭdos la grandiozajn pensojn kiujn mia nova cerbo produktos."

Tiam li adiaŭis ĉiujn per gaja voĉo kaj iris al la Tronĉambro, kiel li frapis al la pordo.

"Envenu," diris Oz.

La Pajlulo eniris kaj ekvidis la vireton sidanta ĉe la fenestro, en profunda pensado.

"Mi venas por mia cerbo," diris la Pajlulo, iomete maltrankvile.

"Ho, jes; bonvole sidiĝu en tiu seĝo," respondis Oz. "Vi devas pardoni, ke mi devas demeti vian kapon, sed mi devos fari tion por meti la cerbon en la ĝustan lokon."

"Nu, bone," diris la Pajlulo, "Sentu vin libera por demeti la kapon, nur se ĝi estos pli bona kiam vi remetos ĝin."

Do la Sorĉisto malligis lian kapon kaj malplenigis ĝin de la pajlo. Tiam li eniris la malantaŭĉambro kaj prenis iom da brano, kiun li intermiksas kun granda kvanto da pingloj kaj kudriloj. Post ĝisfunda skuado li plenigis la supron de la kapo de la Pajlulo per la miksaĵo kaj remburis la ceteran spacon per pajlo por teni ĝin firme. Post kiam li religis la kapon de la Pajlulo sur lian korpon li diris al li,

"De nun vi fariĝos granda viro, ĉar mi donis al vi tre akran cerbon."

La Pajlulo estis kontenta kaj fiera pro la plenumo de sia plej granda deziro, kaj varme dankinte al Oz reiris al siaj amikoj.

Dorotea rigardis lin scivoleme. Lia kapo elŝvelis ĉe la supro pro la cerbo.

"Kiel vi nun sentas vin?" ŝi demandis.

"Mi sentas min ja saĝa," li respondis serioze. "Kiam mi alkitimiĝos al mia cerbo mi scios ĉion."

"Kial tiuj pingloj kaj kudriloj elŝoviĝas el via kapo?" demandis la Stana Lignohakisto.

"Tio pruvas, ke li estas akra," diris la Leono.

"Nu, mi devas iri al Oz kaj ricevi mian koron," diris la Lignohakisto. Do li marŝis al la Tronĉambro kaj frapis al la pordo.

"Envenu," vokis Oz, kaj la Lignohakisto eniris kaj diris,

"Mi venas por mia koro."

"Nu, bone," respondis la vireto. "Sed mi devos tranĉi truon en via brusto, tiel ke mi povos meti la koron en ĝustan lokon. Mi esperas ke tio ne dolorigos vin."

"Ho, ne," respondis la Lignohakisto, "Mi tute ne sentos ĝin."

Do Oz alportis stantondilon kaj tranĉis malgrandan, kvadratan truon en la maldekstra flanko de la brusto de la Stana Lignohakisto. Tiam li iris al komodo kaj elprenis beletan koron, farita tute el silko kaj remburita per seĝaĵo.

"Ĉu ĝi ne estas belaĵo?" li demandis.

"Ja, estas!" respondis la Lignohakisto, kiu estis tute kontenta. "Sed ĉu ĝi estas afabla koro?"

"Ho, tre!" respondis Oz. Li metis la koron en la bruston de la Lignohakisto kaj tiam remetis la kvadraton de stano, kunlutante ĝin nete, kie ĝi estis tranĉita.

"Bone," li diris; "vi nun havas koron pri kiu iu ajn viro povas esti fiera. Mi bedaŭras ke mi devas meti flikaĵon sur vian bruston, sed mi ne povis ne fari tion."

"La flikaĵo ne gravas," ekkriis la feliĉa Lignohakisto. "Mi volas danki al vi, kaj mi neniam forgesos vian komplezon."

"Ne dankinde," respondis Oz.

Tiam la Stana Lignohakisto reiris al siaj amikoj kiuj deziras al li ĉiun ĝojon pro lia bonŝanco.

La Leono nun marŝis al la Tronĉambro kaj frapis je la pordo.

"Envenu," diris Oz.

"Mi venas por mia kuraĝo," anoncis la Leono, enirante la ĉambro.

"Bone," respondis la vireto. "Mi venigos ĝin por vi."

Li iris al ŝranko kaj, etendante la brakon al alta breto, deprenis kvadratan, verdan botelon, kaj elverŝis la enhavon en verdoran, bele skulptitan pladon. Ĉi tiun li metis antaŭ la Timema Leono, kiu snufis ĝin kvazaŭ ĝi ne plaĉis al li. La Sorĉisto diris,

"Trinku."

"Kio ĝi estas?" demandis la Leono.

"Nu," respondis Oz, "se ĝi estus interne de vi, ĝi estus la kuraĝo. Vi scias, kompreneble, ke la kuraĝo ĉiam troviĝas interne de iu; tial ĝi ne povas esti nomata kuraĝo ĝis vi ĝin glutos. Do mi konsilas al vi gluti ĝin kiel eble plej baldaŭ."

La Leono ne plu hezitis sed glutis ĝis la plado tute malplenigis.

"Kiel vi sentas vin nun?" demandis Oz.

"Plena de kuraĝo," respondis la Leono, kiu reiris ĝoje al siaj amikoj por sciigi al ili sian bonŝancon.

Oz, lasita sola, ridetis pensante pri sia sukceso doni al la Pajlulo kaj la Stana Lignohakisto kaj la Leono ĝuste tion, kion, laŭopinie, ili deziris.

"Kiel mi ne povas esti ĉarlatano," li diris, "kiam ĉiuj homoj devigas min fari tion, kio ne povas esti farata? Estis facile, feliĉigi la Pajlulon kaj la Leonon kaj la Lignohakiston, ĉar ili imagis ke mi povas fari ĉion. Sed neĉesos pli ol imago por reporti Dorotean returne al Kansaso, kaj mi estas certa, ke mi ne scias fari tion."

Dum jarono de jarcento la kompanio Stafeto restas la agnoskita ĉefeldonisto de la Esperanta literaturo. Bedaŭrinde, multaj el la fruaj verkoj eldonitaj de tiu kompanio jam delonge elĉerpiĝis. Kelkaj el ili (ekzemple *La Bapto de Caro Vladimir*, *La Infana Reĝo*) estas haveblaj en novaj enkarnigoj de aliaj kompanioj; aliaj (*La Floroj de la Malbono* de Baudelaire, *Songe Sub Pomarbo* de Baghy, la *Esperanta Antologio*) restas tute nehaveblaj.

En la stoko de la libroservo de ELNA restas kelkaj emzempleroj de diversaj Stafetaĵoj. Sube ni donas liston, kiun vi eble povos utiliĝi. Ni devas tamen averti vin, ke post elĉerpiĝo ni ne (almenaŭ laŭ nia nuna scio) povos rehavi stokon de: BL 17-27, BL 37, PS 3-4, M 2-5, BK 1-45.

De BL 23, BL 25, kaj BK 43 restas nur po unu ekzemplero.

La prezoj estas en Usonaj dolaroj kaj ne inkluzivas sendokostojn aŭ imposton. Al via mendo almetu 10% (minimume \$1.00) por sendokostoj; kaj se la mendo iras al adreso en Kalifornio, almetu 6½% por imposto. Prefere nomu alternativajn librojn, se iuj menditaj estas jam elĉerpitaj.

#### Belliteratura Serio:

BL 17	Topaze/La Ŝipego Tenacity (Pagnol/Dildraç)	6.00
BL 23	Soifo (Tarkony)	7.00
BL 25	Maskerado ĉirkaŭ la morto (Švarc)	7.50
BL 27	Kantoj kaj Romancoj (Heine)	8.00
BL 33	Brand (Ibsen)	12.95
BL 35	Elektitaj Fabloj (Krilov)	12.50
BL 36	La Trofeoj (de Heredia)	7.25
BL 37	La Granda Kaldrono (Francis)	26.95
BL 38	La Nova Tutikisto de Nukugaia (Potts)	9.25
BL 39	Ĉu li bremsis sufiĉe? (Valano)	7.50
BL 40	Kara diablino (Boatman)	7.00
BL 42	Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo (Sekelj)	6.25

#### Polularscienca Serio:

PS 3	La Bela Subtera Mondo (Tell)	6.00
PS 4	Senĝenaj dialogoj (Fernandez) [Fiziko]	10.50
PS 5	Esperantologiaj studoj (Wüster)	15.00

#### Serio Movado:

M 2	La Zamenhofa Esperanto	7.00
M 5	Bona Ŝanco (Bormann)	6.00
M 7	Pri Lingvo kaj Aliaj Artoj (Auld)	11.00
M 8	Ĉiu Ĉiun (Jung)	32.50
M 10	1887 kaj la sekvo (Waringhien)	20.95

#### Beletraj Kajeroj:

BK 1	Ŝtupoj sen nomo (Ragnarsson)	3.25
BK 2	Pinta Krajono (Rossetti)	3.25
BK 3	Nur Tri Kolorojn (Urbanova)	3.25

BK 5	Junaĝa Verkaro (Privat)	3.25
BK 7	Ombroj de la kvara dimensio (de Kock)	3.25
BK 8	Reeĥoj el Jugoslavio	3.25
BK 9	Nova Ezopo (Urban)	3.25
BK 12	Planlingvaj Problemoj (Gilbert)	7.50
BK 14	Elingita Glavo (Verdiro)	4.00
BK 15	Ekzilo kaj Azilo (Emba)	4.00
BK 18	Vivo kaj opinioj de majstro M'Saud (Ribillard)	4.00
BK 19	Duonvoĉe (Maŭra)	4.00
BK 20	Sen paraŝuto (Thorsen)	4.00
BK 21	Sub stelo rigida (Thorsteinn)	4.00
BK 22	Maŝinmondo (Szathmari)	4.00
BK 24	Sur la vivovojo (Logvin)	4.00
BK 26	Romeo, Julieta, kaj la Tenebro (Otĉenašek)	4.00
BK 30	Vesperkanto (Adamson)	4.00
BK 33	El Tero kaj Etero (Pioro)	4.00
BK 35	Arĉoj (Mattos)	4.00
BK 37	Eta Vivo (Guglielminetti)	4.00
BK 38	Estiĝo de la tero kaj de la homo (Tell)	4.00
BK 41	Vojo kaj Vorto (Nogueira)	4.00
BK 42	Invit' al Japanesko (Miyamoto)	4.00
BK 43	Cigana Romancaro (Garcia Lorca)	4.00
BK 44	Esploroj (Ragnarsson)	4.00
BK 45	Ni Devas Vivi (Gabrielli)	4.00
BK 48	Primico (Tagor)	4.00

En la komenco de la sesdekaj jaroj, per luksa eldono de la libro *La Dia Komedio* de Dante Alighieri (jam delonge nehavebla), la instancoj de Esperantujo, lige kun UNESCO, komencis eldoni serion de libroj, kiuj provizos al la Esperantistoj eblecon frandi la literaturojn de la tuta mondo: Serio Oriento-Okcidento. Ĝis nun aperis en tiu serio almenaŭ 15 libroj, plus du eksterordinaraj eldonoj (*La Dia Komedio*, *La Nobla Korano*).

En la suba listo, vi trovos tiujn, kiuj estas haveblaj per nia libroservo.

#### Serio Oriento-Okcidento:

O 1	Malsata Ŝtono (Tagore) [Bengalio]	6.95
O 3	La Naŭzo (Sartre) [Francio]	4.50
O 4	Kalevala (nacia eposo) [Finnlando]	15.00
O 6	Reĉ Lear (Shakespeare) [Anglio]	3.95
O 7	Kvin Virinoj de Amoro (Ihara) [Japanio]	5.95
O 8	La Spleno de Parizo (Baudelaire) [Francio]	9.00
O 9	El la Vivo de Syunkin (Tanizaki) [Japanio]	3.95
O 11	Neĝa Lando (Kawabata) [Japanio]	9.75
O 13	Brand (Ibsen) [Norvegio]	12.95
O 15	Elektitaj Fabloj (Krilov) [Rusio]	12.50

Respondecas: ELNA, Box 1129, El Cerrito CA 94530 Usono

## PARTOPRENU LA AGADON!!

Ne restu en la kulisoj...

estiĝu MEMBRO DE ELNA  
(Esperanto League for North America, Inc.)

Tiel vi helpos Esperanton en Norda Ameriko,  
tiel vi helpos Esperanton en via loko,  
tiel vi helpos vin mem!

MEMBRIĜU AŬ REMEMBRIĜU HODIAŬ!

(Notu la novajn kotizojn por 1981)

UZU LA KONVENAN RESPONDILON SUBE!

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA – BOX 1129, EL CERRITO, CA 94530

Enclosed is \$\_\_\_\_\_ for  new  renewal membership in ELNA for the year 1981.

Enclosed is \$\_\_\_\_\_ as my tax-deductible donation to ELNA.

NAME \_\_\_\_\_ Name and address of each new member published  
in *ELNA Newsletter* and next edition of the

ADDRESS \_\_\_\_\_ *ELNA Adresaro* unless member indicates otherwise.

CITY, STATE, ZIP \_\_\_\_\_

**Check correct category:**  Regular (\$20)  Family (\$30)  Youth (18 or under) (\$10)

Student (full-time, 25 or under) (\$10)  Senior (65 or over) (\$12.00)  Life (\$400)\*

(NOTE: If joining after July 1st, for remainder of year plus full following year send 1½ times yearly dues shown)

DATE OF BIRTH (If applying for Youth, Student, or Senior Membership) \_\_\_\_\_

Telephone Number: Area Code [ ] \_\_\_\_\_ Radio Call Sign \_\_\_\_\_

May we publish your telephone number in the *ELNA Adresaro*? \_\_\_\_\_ May we publish your address? \_\_\_\_\_

\*-Life membership paid prior to Jan. 1, 1981, remains \$360!